

# La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 22 - Januaro - Februaro - Marto

ISSN 0986 - 1181



Ĉefartikolo

## Karaktero de lingvo

Ne ĉiu lingvo same kondukas rilate al sia evoluo, nek rilate al la influado de la aliaj lingvoj. Tiel same por la individuoj. Laŭ iuj el ili en iu lingvo estas bonaj la formoj, la stiloj, kiuj respondas al ia imago pri ia idealo de la lingvo mem, ja tiuj kiujn ili formis al si dum longa periodo de persona rilatado kun la koncerna lingvo.

Ekzemple, iuj Esperantistoj ial imagas, ke Esperanto devas esti plej simpla lingvo. Konsekvence laŭ ilia dogmo en la lingvo malbonaj estas ĉiuj esprimoj, kiuj eliĝas el rudimenta stato pro malsimpla nomenklaturado aŭ elvokiva nuancaro!

Aliaj ial imagas, ke nia lingvo devas dueli kun aliaj lingvoj por akiri por si la samajn valorojn, kiuj igos ĝin kapabla esprimi la plej fajnajn delikatecojn de la penso. Tiuj homoj konstante konfliktos kun la adeptoj de la simplismo, ĉar ili volos, ke Esperanto egalas la kulturajn lingvojn, dum iliaj oponentoj jam dekomence rezignis tian celadon.

La unuaj daŭre serĉos la plej banalan ideon, kiun ili esprimos sennuance, evitante ĉian malfacilon. La lastaj preferos la ĉarmon de la subtilaĵoj kaj, ekzemple, provos venki la plej malfacile tradukeblajn tekstojn por levi nian lingvon al kiel eble plej alta nivelo.

Cetere aliaj serĉas la rimedojn ĉion esprimi plej racie, dum iuj male deziras fuĝi de la racio kiel de pesto, preferante la esprimadon per fantaziaj bildoj. Ĉiu trovu sian bonon laŭ sia imago. Ĉiu estu tolerema al la imago de aliaj. Ja tio estas konsilinda, ĉar ial estas imaginde, ke lingvo estu ĉiuflanka!

Kiam imago ne plu tenas la nuran individuon, sed la influon plimulton de la uzantoj de difinita lingvo, tio kontribuas doni ian koloron al la nomita lingvo. Tial kutime oni konsideras la Francan lingvon kiel **abstrakt-eman**, dum oni rigardas la Anglan kiel **konkret-eman**. Ekzemple, en la Franca *oni en-iras en butikon kurante*, dum en la Angla *oni kuras en butikon*; en la Franca ĉefas unue la abstrakta al-movo, dum en la Angla preferinde la konkreta ag-maniero. Sed envere la lingvoj mem restas senpovaj antaŭ la imagoj de siaj popoloj : ili nur transportas la diversajn ide-esprimojn; kaj kiel tiaj ili estas neŭtralaj!

Kiam tiaj nocioj invadas Esperanton, oni bedaŭrinde alvenas tro rapide al agresemaj ekstremoj, kiuj ne estas bonvenaj . . . Nia lingvo efektive ankoraŭ ne havas tiel ampleksan popolon, kiu povus garantii al ĝi ian stabilecon inter la batalantaj imagoj.

D-ro André ALBAULT



## Kroniko de la nuntempo

# **GE-SAM-IDE-AN-O-J**

Esperantio ideale estas la tutplaneda socia medio, en kiu estas parolata Esperanto kaj reganta la "interna ideo" de interhoma frateco kaj justeco, kiu esence fondas kaj ja estigis la lingvon . . . Tial dekomence la geesperantistoj kutimis reciproke alparoli sin "gesamideanoj", unu dolĉa vorto tiel kara al ilia koro, same kiel "gesamlandoj" . . .

Nu el Usono iu fidela leganto de "LA LETERO" ĵus skribis jene :

*"Dum mia pli ol kvindek-jara esperantado mi rimarkis, ke la karesa vorto "samideano" estas iom post iom depuŝata elde la uzado en libroj, gazetaroj kaj korespondado. Eĉ plie, multaj komencantaj esperantistoj el la novaj generacioj ne scias, kion ĝi signifas; aliaj ignoras la vorton kaj ankoraŭ aliaj, malgraŭ ĉia atendo, malrespektas pri ĝi. Ĉu mi povas . . . sugesti, ke vi verku por "LA LETERO" . . . artikolon, pri la animtuŝa signifo de la vorto "samideano"? . . .*

Efektive jam de la Universala Kongreso en Hamburgo (1974) la etoso de Esperantio multege ŝanĝiĝis : interalie akriĝis kaj multiĝis la polemikaj eĉ vipaj kritikoj, se ne intrigoj! El ĉio ĉi sekvas la nuna situacio, ĉu mirinde? Ne, bedaŭrinde!

Sendube sonoras nun la tempo remediti pri kelkaj versoj de D-ro L. L. Zamenhof :

*Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,  
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro  
Al frata la celo ni iru obstine  
Antaŭen, senfine!*

Kaj anstataŭ malŝpari forton kaj tempon en aĉaj polemikoj, estas preferinde, gesamideanoj, inspiriĝi el la poeto Geraldo Mattos :

*Mi kantu nur por vi! Ĝis lasta spiro,  
Mi estu via bardo, ho homaro!*

J. T.

# PROBLEMOJ DE PRONONCO

Mi listigas ĉi-sube demandojn pure praktika-  
jn, kiujn oni ne ofte diskutas. Estus bone okazigi  
esploron de la uzado en nia lingva komunumo  
pri tiaj punktoj kaj aliaj similaj, krom gramati-  
kaj, kiujn oni ĝenerale serioze atentis kaj foje pri-  
sondas. Sen statistiko, oni ne povas diri ion kun  
aŭtoritato, aŭ kun normiga intenco. Tio kompre-  
neble dependas de financaj rimedoj disponeblaj al  
la Akademio.

## I. VOKALOJ

### a) Akcento

1. *Zamenhof*, aŭ senfinajaj substantivoj :  
ĉiuj prononcas tiun ĉi nomon kun akcento sur  
*Za-* krom la Japanoj, kiuj akcentas *-men-*, ĉiam  
kiam ili parolas en la Japana kaj tre ofte samma-  
niere ankaŭ parolante en Esperanto.

Laŭ la 10-a Regulo, la prononco devas esti  
*Zaménhof*, se la vorto estas Esperanta. Ĝi ja  
estas registrita en *PIV*, notite Fundamenta, do de-  
vas esti Esperanta vorto. Troviĝas aliaj substanti-  
voj sen la finaĵo *-o*. Tio estas, ekzistas substanti-  
voj, kiuj ne observas la 2-an Regulon.

La prononco *Zámenhof* estas do erara. Aŭ  
ĉu? Temas pri la etendo de aplikeblo de la 10-a  
Regulo.

*Abraham* estas ankaŭ Esperanta nomo, regi-  
strita en *PIV*. Ĝi reprezentu, por ekzempla celo  
en tiu ĉi eseeto, aliajn similajn substantivojn (ili  
ĉiuj estas propraj nomoj) sen finaĵo. Laŭregule,  
ĝi devas prononciĝi *Abráham*; multaj, inkluzive  
de *Zamenhof*, uzas la formon *Abrahamon* por la  
akuzativo. Oni estas tentata prononci *Abrahám*  
analoge al la akuzativo, sed tio estus kontraŭ-  
Fundamenta (kvankam tio estus tute laŭregula,  
se sin trovas apostrofo ĉefine, kiel *Abraham'*); la  
akcento do moviĝas laŭ la kazo, kiel la Latina  
*cústos*, *custódes*. Ĉu oni konsentas? Kion plue pri  
la Kabea *Nítager*, *Nítageron*? Kaj la *Zamenhofa*  
*Baharáh* (laŭ *Duden* ['baxarax]), *Baharáh*?

*Zamenhof* uzas du formojn, *Fortinbras'* kaj  
*Fortinbras*, kaj laŭ la metriko oni scias, ke li me-  
tis akcenton sur *-bras* en la dua okazo (*Hamleto*,  
*IV*, *iv*, 3). Malgraŭ la samaj ortografio kaj pro-

nonco (aŭ, ĉu oni prononcas la duan *Angle?*), la  
unua estas Esperanta vorto dum la dua ne-Espe-  
ranta kun la diferenco de provizo aŭ ne de  
apostrofo.

En la *Fundamenta Krestomatio* (Kofman,  
"Filino de Iftah"), troviĝas la formoj *Ben-Jáir*  
kaj *Máhir*, kie la akcentomarkoj estas superflujaj,  
se ne por averti la legantojn, kiuj supozeble emas  
meti akcenton sur la lastan silabon (estas skolasti-  
ka problemo, ĉu tiuj vortoj estas Esperantaj). Tio  
cetere igas la uzon de la marko esti aŭtenta en  
Esperanta teksto, kio pravigas ĝian uzon por la  
indiko de proksimuma prononco de etnaj propraj  
nomoj (vidu la punkton 9 malsupre). Parenthese,  
*Iftah* devigas prononcadon de *h* ne sekvata de vo-  
kalo, laŭ la 9-a Regulo.

Kiel oni prononcas *Waringhiena*? Pri *Varin-  
ghiena* ne estas dubo, oni prononcas ĝin kiel kiu  
ajn Esperanta vorto. Al mia demando, profesoro  
*Waringhien* skribe konsilis, ke oni devus pronon-  
ci la propranoman parton kiel en etna lingvo kaj  
poste, kun paŭzeto, la adjektivan finaĵon *a* (mia  
ekzemplo tiam ne estis *Waringhiena*, sed *Heideg-  
gera!*). Mia emo estis [var'gje:na], t.e. la Esperan-  
ta elparolo komenciĝas ne ekde la finaĵo sed ek-  
de la silabo antaŭ la gramatika finaĵo, se la li-  
terumo estas *Waringhiena*, sed ne *Waringhien'a*.  
Ĉu tio estas mia idiosinkrazio? [var'gje]-a sen-  
tiĝas tiel maloportuna. Ĉiu konas la Ĉinismon  
de la tipo *Heilongjiang-provinco*, gramatike ĝu-  
sta, sed malagrabla prononcebla, kaj kiun elparo-  
lante, oni devas atendi ĝis la silabo *-vin-* antaŭ ol  
oni atingas la akcenton, malsimile al longaj Ger-  
manaj kunmetitaj vortoj, en kiuj la akcento estas  
sur la antaŭa determina elemento, t.e. la propa-  
noma parto. Kio pri la adjektivo *Heilongjiang'a*?  
Se oni obeas la Varingjenan konsilon supre, la et-  
nolingva parto prononciĝas etnolingve, la Espe-  
ranta akcento ne observiĝas kun tuta oportune-  
co. Ĉu same pri la kunmetita vorto? Povas esti la  
pruvo de la ĝusteco de la Varingjena teorio.

### b) Longigo

2. *Edzo*, aŭ dulitera afrikato : jam estas esta-  
blita la praktiko longigi akcentitan vokalon en  
malfermita silabo. Tio estas, la Esperanta akcen-

to estas properispomena (longa vokalo sur la antaŭlasta silabo, *ndlr*) en la malfermita, kaj paroksitona (ne longa vokalo sur la antaŭlasta silabo, *ndlr*) en la fermita silabo. Tamen troviĝas dubindaj okazoj: ekz-e, *PAG* priskribas *dz* kiel la voĉigo de *c*, tial *edzo* dissilabiĝas *e-dzo*, longigante, supozeble, la vokalon *e*, sed ŝajnas laŭ mia observo, ke por la plimulto la divido estas *ed-zo*, farante la unuan silabon fermita, do mallonga, kaj *d-z* estas prononcata ne aparte, sed kiel "duobla" afrikato, afrikato kun reteno en la plozi-va parto. Same pri *adzo*.

Kutimo ŝanceliĝas pri silabigo de la konsonant-sinsekvo *kv*: *ak-vo*, *a-kvo*; *oblik-va*, *obli-kva*, kaj la plimulto ŝajne pli aŭ malpli estas regata de la etna lingvo, kiun ĉiu el ili respektive konas: *ak-vo* laŭ la Itala *acqua*, *a-kvo* laŭ la Hispana *agua*, *obli-kva* ĉe la Japanoj, influitaj de la Angla. Mia starpunkto ĉi tie ne estas difini ian subjektivan regulon sed trovi la faktojn, kiel dirite ĉekomence, mi do instigas sondadon ankaŭ ĉi tie.

### c. *Larĝeco*

3. La problemo de larĝeco de *e* kaj *o* ne ekzistas por multaj gentoj, sed por tiuj, kiuj ĝin havas, la konsilo de *PAG* ŝajnas prudenta. Tamen kion do oni diras por tiuj, kiuj havas larĝan kaj mallarĝan variantojn por aliaj vokaloj, kiel *i* kaj *u* ĉe Anglo- kaj Germano-parolantoj? Kaj ankaŭ por *a* ([ɪ] kaj [ʌ]), kiujn ankaŭ la Franca havas? *PAG* estas unuflanka tiurilate.

## II. KONSONANTOJ

4. *nj*, aŭ palatigita *n*: Prononci *-nj-* kiel [ɲ] estas tolerata jam de Zamenhof (*Lingvaj Respondoj*, 71), sed ĉu oni prononcas *konjekt* [kɔjɛkti]? Tion inhibicius etimologia sento. Ĉu oni pro tio povas deklari erara la prononcon de tiu vorto fare de ne-Eŭropanoj, kiuj ne havas diakronian konscion pri unuradika Esperanta vorto, per "mola" (palatigita) *n* analoge al *panjo*? Evidente ne. Kion diri? Tio ĉi ankaŭ envolas la silabigon /*nj-* aŭ *-nj-*.

5. *-ĉjo*: ĉu oni distingas en konversacio inter *ĉo* kaj *ĉjo*? Ĉu la unua estas akceptebla en la Zamenhofa senco?

6. Duobla afrikato: la demando pri tio ĉu la kombinoj *dz* (*edzo*) kaj *dĝ* (*budĝeto*) povas esti prononcataj kiel afrikatoj estas jesita en *PAG*, kaj tio ŝajnas kutima en neatenta elparolo kaj tolerbla, sed restas problemo pri ilia prononco kiel duoblaj afrikatoj. Pri la duobla konsonanto ĝenerale diskutas kelkaj. Malgraŭ malaprobaj opinioj, al mi ŝajnas, ke la duobla konsonanto jam akiris civitanan rajton.

7. *ĥ*: ĉu la *ĥ* antaŭ antaŭaj vokaloj povas esti prononcata palatigita? Mi, kun aliaj ne-Germanoj, surpriziĝis al tio, ke al Germanoj mankas konscio de la diferenco inter la du (polemiko en *Inter-Monato*). Ĉu la norma prononco devas esti velara eĉ en neatenta konversacio, t.e. en la

Zamenhofa senco en la *Lingva Respondo 71*? Alivorte, ne kiel en la Germana, sed kiel en la Nederlanda.

## III. INTERNACIA FONETIKA ALFABETO (IFA)

8. La Esperanta alfabeto estas taŭga por Esperanto, sed ne taŭga por aliaj celoj. La internacia normo por fonetika priskribo estas la alfabeto de la Internacia Fonetika Asocio, kaj la esperantistoj devas uzi ĝin por tiu celo. Ĝi ne estas Franca, kiel iuj Usonanoj asertas, sed internacia kiel la metra sistemo, kvankam IFA estis fondita de Francoj kaj Britoj. Ĝi estas bona precipe pro tio, ke ĝi havas "larĝajn" kaj "mallarĝajn" notadojn kaj ke oni povas precizigi ĝin laŭbezone (kritikantoj bazas sian argumentadon nur sur la observado de la "larĝa" notado: la diferenco inter la vokaloj de la Anglaj *bit* kaj *beet* ne estas en la kvanto sed en la kvalito, sed oni laŭ "larĝa" notado priskribas *konvencie* kvazaŭ ĝi estis kvanta); ekz-e, la Angla *t* estas alveolaro dum aliaj Eŭropaj (ankaŭ la Japana) estas vera dentalo, kiujn IFA distingas, *se necese*, per [t̪] kaj [t̥]. Tio tute ne estas arbitra elpensado de individuo, kiel multaj tiaj galimatioj ripetiĝe aperantaj en Esperantaj gazetoj asertas. Incidente, ĉu la velara *t* por Esperanto estas erara?

## IV. REPRESENTO DE FREMDAJ NOMOJ

9. Por proksimuma reprezento de etnaj nomoj, iu grado de normigo estas dezirinda, kaj ŝajnas formiĝadi iom post iom certa interkonsento tra praktiko, precipe de SAT kaj la magazino *Monato*. En tiu okazo, reprezento devas esti rigore en la limo de la Esperanta fonologio. Tial, ekz-e, *Van Ooijen* [Fan Oj'n] (*Monato*, 1993/3, p. 29) estas malbona: *ŝwa* (kiun mi opinias, ke la supermetita *e* reprezentas, kaj tiu arbitreco estas kondamninda: ĝi devas esti [ə], laŭ IFA) ne ekzistas en Esperanto.

a. *Monato* donas prononcon post etna vorto en rektaj krampoj, kiel ĉe IFA, kio estas konvena.

b. *Monato* ankaŭ presas la unuan literon en majusklo, kio estas oportuna pro tio, ke en poramasaj verkaĵoj, en la "demotika" Esperanto, oni povas tute elimini la originalan ortografion kaj ke enkrampaj notoj povas servi kiel modeloj.

c. Akcentoj ne antaŭlastsilabaj estas preferinde markitaj. Ŝajnas, ke estas pli bone ne longigi la akcentitan vokalon krom la penultima. Se temas pri la antaŭlasta, *Taĉa* por *Thatcher* emas esti prononcata [ˈta:t a]: por mallongigi, ĉu skribi *Tatĉa*, kun la risko de duoblo de la sekva konsonanto?

d. Dezirindaj estas reguloj pri metafonioj (umlaŭtoj): la *PIV-a Goeto* estas esperantigita formo, temas ĉi tie pri redono en Esperantaj fonemoj de la originala: ĉu *Gete*? Estas notinde, ke

en similaj problemoj oni devas ne esti tentata de reguligo fare de iu instanco, kiel la Akademio, kies tasko estas pli konsekri la formiĝantan uzadon *post festum* ol ukazi. Oni povas stimuli la konscion de nia diasporo. Samo povas esti dirata pri aliaj punktoj, kiel : reprezento de la Angla *th* ([t̪], [t̪] : *t*, *s*, aŭ *f*, kiuj ĉiuj sin trovas en realo), de la Angla *r* ne sekvata de vokalo (restigi aŭ ellasi : kontraŭstaro inter la Usona kaj la Brita), de la nazalaj vokaloj (konservi *n* aŭ ellasi : *Miteran'* aŭ *Mitera'* [kun apostrofo, la akcento estas sur la ultimo]).

e. La normigita sistemo de *El Popola Ĉinio* por skribi la Ĉinajn sonojn en Esperantaj literoj estas oportuna. Ĝi estas aparta sistemo paralela al la ortografio *pinyin*, kiel *Bejĝjĝing* por *Bejĝing*. (Aliflanke, oni devas povi ankaŭ skribi *Peĝino*, laŭ nia lingva tradicio, kion nei estas malriĉigi nian kulturon. Pri *Tokio*, mi volus reteni tiun ĉi malnovan, firme esperantigitan formon, malgraŭ ĝia distanco de la reala prononco. Ĉiuj lingvoj devas havi sian, kaj la esperantistoj parolantaj ĝin devas klopodi al unuecigo, sed kun la konscio, ke ĝi havas nur utilisman valoron kaj ne

povas anstataŭi la aŭtentan ortografion. Esperanta literumo por ortografie skribi Japanajn vortojn estas same erara kiel la Angleca sistemo Hepburn (*Uĉida*, bona por demotikaj Esperantaj tekstoj, aŭ *Uĉida*, utila por turismantoj Angle aŭ Hispane parolantaj, anstataŭ la ĝusta *Utida*).

f. Aparte de la problemo de fonetiko, estas dezirinde, ke ĉiu lingvo havanta ne-Latinan skribon fiksu oficialan Latinan ortografion kun ekzakta biunivoka respondo kun la propra ortografio. La Japana kaj la Ĉina havas tiajn, kiuj estas proklamitaj de ISO (Internacia Organizo por Normigo) kiel ISO 70978 de 1982 por la Ĉina kaj ISO 3602 de 1989 por la Japana. La Korea estos diskutata ĉe ISO ekde la venonta Aprilo.

Pri la Rusa, ekzistas la sistemo de la biblioteko de la Usona Kongreso, sed ĝi estas Angleca de kap'ĝis piedo : oni povas uzi la Esperantan alfabeton pli efike. La restantaj punktoj estas kiel transskribi *ĉ* kaj *ĉ* ; mi pensas ke *j* kaj *nulo* sufiĉas kaj ke por tia okazo kiel *ĉ* kaj *ĉ* estas bonaj *Iĵ'ic* kaj *c'jezd*. La diakritoj devus pli bone esti la ĉeĥa hoketo ol la Esperanta ĉapelo pro internacieco.

**Rimarko de la Redakcio.** — Jen pluraj interesaj demandoj por la Sekcio pri prononcado de la Akademio! Tamen pri la "akcento" en propraj nomoj, ĉu ne estas pli simple (interalie ĉar pli regule, do pli Esperantece) konsideri la proprajn nomojn (fakte substantivojn) kiel vortojn kun eliziita finaĵo *-o*, des pli cetere, ke por la akuzativo oni retrovas ĝin (Abrahamon!)? — J. T.

**Lego-notoj :** 1. Ŝajne la nocio, se nur oni agnoskus ĝin, de *licenco al la Regulo 16*, proponita en la Fundamento (9-a eldono, p. 342) kaj laŭ kiu la apostrofo povas manki en propraj nomoj, solvas preskaŭ ĉiujn demandojn kaj dubojn de tiu punkto.

2. Supozeble multaj konsideras *dz* kiel du sinsekvaj konsonantoj!

Fakte la Itala *acqua* valoras [ak-kwa] kaj la Hispana *aqua* [a-kwa]. Sed por Esperanto ni ŝajne povas akcepti, eksterpolante la dirojn de Zamenhof

en lia *Lingva Respondo 71*, ke, se la teorio devigas nin prononci *kv* kiel *k + v*, en la praktiko tio malfacilas. Fonetiko instruas al ni, ke senvoĉaj kaj voĉaj konsonantoj influas unu sur la aliajn. Sekve *kv* praktike fariĝas aŭ [kf] aŭ [gv], sed ekzistas ankaŭ la ebleco de [kw] (labio-velaro); cetere ĉi tiun prononcon oni aŭdas sufiĉe ofte. Ŝajne ĝi estas kaj pli oportuna (ankaŭ el etimologia vidpunkto) kaj pli eleganta ol ambaŭ aliaj.

3. "largeco", kvalito de vokaloj, ankaŭ nomata : *vasteco*.

4. Ŝajne oni prononcu *nj* tute same, kiu ajn estas ĝia pozicio en vorto. Tio ŝajne plej konformas al la Regulo 9. Tie la Sanskrita fonetiko estas instrua; ĝi konsideras, ke la kvar konsonantoj *j, r, l, v* (eble [w]?) fakte estas duonkonsonantoj : ili kondukas iom malsame en la dissilabigo! Tio plej evidentas por *r*, sed ankaŭ por la aliaj tio ŝajne ĝustas en Esperanto.

5. IFA : ĝi ne estas la sola

fonetika alfabeto en uzado. Ni restu neŭtralaj rilate al la diversaj protagonistoj. Sed ni rezervu la signojn [] por IFA, kiel estis farite supre. Ŝajnas preferinde uzi aliajn signojn, se ni anstataŭe uzas la Esperantan alfabeton, kompletigitan aŭ ne!

6. La Akademio oficialigis la paralelan formon *buĝeto*. Per "duobla afrikato" la aŭtoro supozeble komprenas, ke la prononco de *dĝ* realiĝas per duobla "plosivo" (duobla okluzivo), sekvata de kontinua : *dĝ* = *dd + ĵ*. Afrikato striktasence ne povas duobliĝi!

9.a) La esenca demando restas : ĉu ni reprezentu la (malfacilajn) sonojn aŭ la (konatan) ortografion? Ĉu ni senutile klarigu la prononcon (kiun nur IFA povas klarigi kaj nur specialistoj kapablas prononci)? Ekzemple, se ni klarigas *David* per la proksimuma *=(devid)*, al kio tio utilu? La Esperanta formo estas *Davido*, kaj supozeble la plimulto di-

venas ĝin legante *David!* Granda plimulto de kazoj estas simila! La ceteraj malfaciloj venas ĉefe de la jota kaj igreka grafemo-fonemaj zonoj (Akademias Studoj 1987); alidire de la malsama traktado de ĉefe la litero *j*.

b) Cetere ĉu ne estas baza antinomio inter la uzado de Esperanto kaj la uzado de "internaciaj normoj", kiuj nur no me estas internaciaj, sed envere estas naciaraj: ili nur apudmetas la postulojn proprajn al la nacioj (aŭ al nur la plej grava el ili!).

c) Tute aparte la ISO-normoj por transskribo el diversaj alfabetoj estas nek koheraj inter si, nek "biunivokaj" (vd: "Li kaj Ni", 1985), nek pli internaciaj ol priskriboj bazitaj sur

Esperanto. Ekz-e, la grafemo *j* en la ISO-transskribo por la Rusa respondas al eĉ tri Cirilaj literoj. Esperantisto ja povas individue uzi tiajn normojn, se unu el ili ŝajnas oportuna al li. Sed la movado grave erarus, se ĝi enjungiĝus en ili: ni restu sendependaj. Potenculoj akceptos nin nek pli bone, nek pli malbone.

d) Ni kompreneble respektu la naciajn ortografiojn; se ili estas Latin-skribaj, ni povas senmodife uzi ilin, krom se ni nepre deziras asimili: por ĉiu lingvo oni starigu asimilo-regulojn. Se ekzistas iu nacia oficiala transskribo al la Latina skribo, ĝi funkcias por ni kvazaŭ unu plia nacia skribo. Por aliaj transskriboj (Usonaj aŭ "normaj") ĉiu restu libera.

e) Japana korespondanto defendas la formon *Tokjo*, kiel pli konforma al la Japana *Tokyo* (*Tōkyō*). Ĝi ankaŭ troviĝas pli konforma al la internacia *Tokyo* de la okcidentaj lingvoj; supozeble ankaŭ de multaj aliaj lingvoj. La iama Franca ortografio *Tokio* cedis al *Tokyo* pro la konscia Franca agnosko de la Japana ortografio. Ĉu Esperanto estu pli ŝovinisma?

f) Ni jam devas klopodi por havigi al ni la Esperantajn literojn kun cirkumfleksoj! Ĉu nun ni klopodu por la renversitaj cirkumfleksoj, kiuj estas nur parte inter-Slavaj, ne internaciaj! Ĉu ni ŝanĝu la Esperantajn al la Slavaj? al la signoj de IFA?

— A. A.

## Demandoj kaj Respondoj

D. — *Mi kunigas ĉi-sube naŭ kunmetitajn vortojn en duobla formo: kun ellaso de la finaĵo de l'unua elemento kaj kun konservo de tiu finaĵo... Ĉu unu el la formoj estas preferinda al la alia kaj, je okazo jesa, kial la preferata formo estas preferinda?*

1) Esperantuzanto = Esperantouzanto, 2) Esperantorganizo = Esperantoorganizo, 3) danĝeraverto = danĝeroaverto, 4) vortefiko = vortoefiko, 5) libreblemo = libroemblemo, 6) lingvuzo = lingvouzo, 7) akvinsekto = akvoinssekto, 8) tetrinkado = teotrinkado, 9) aknodoro = aknoodoro.

Ĉu tiuj ĉi vortoj estas akcepteblaj sen dividstreko apartiganta la elementojn? (C. I. de J. — Usono)

R. — Principe ambaŭ formoj estas ĝustaj; kaj laŭ mia lingvosento nur ia demando de eŭfonio (belprononco) kaj klareco, kvazaŭ stilharmonio, povas preferigi unu al la alia, kaj tial la dividstreko estas faktoro pri evito de miskomprenebleco same, kiel la konservo de vokalo fojfoje post pli ol unu konsonanto: Esperanto-uzanto, Esperanto-organizo, danĝer-averto, vort-efiko, libro-emblemo, akvo-inssekto, te-trinkado sed akno-odoro. (J. T.)

D. — *La jenaj esprimoj, kiujn mi trovis en la lastatempa gazetaro, min impresis kiel ne tute ĝustaj:*

1) "... rasismo estas malbono nek ekzistebla nek ekzistanta en Latinidaj landoj".

Ĉu "ekzistiva" taŭgus anstataŭ "ekzistebla"? (J. Smith)

R. — Efektive "ekzisti" estas netransitiva verbo, kiu malfacile akceptas la pasivan sencon de la sufikso "ebla", eĉ kvankam D-ro L. L. Zamenhof iafoje uzis ĝin ekzemple en la vorto "ven-ebla". Sed tiam necesas rimarki, ke la verbo estas mov-verbo: oni diras "vojo irebla", ĉar oni diras ankaŭ "iri vojon"; sed oni ne povus diri: "ekzistion"; sekve estas preferinde: malbono nek ekzistanta nek povanta ekzisti (ekzistopova). (J. T.)

2) "Tiu ĉarma virino estis longtempe esperantisto".

La genro de la vorto "esperantisto" estas vira, ĉu ne? Se temas pri virino, kial ne diri "esperantistino"? (J. S.)

R. — Ĝuste "kial"? Verŝajne temas pri influo de la Anglalingva substratumo! Jam plurfoje en *LA LETERO* pluraj legantoj kritikis la ne-uzon de "in", eĉ nome de feminismo. Devus esti aŭ "longtempa esperantistino" aŭ "longtempe esperantista". (J. T.)

3) a/ "... la nombro de individuaj membroj de UEA superis ok mil" b/ "... paro de geamantoj ..."

Kiam oni parolas pri kvanto, nombro, la ĝusta prepozicio estas da, ĉu ne vere? (J. S.)

R. — La Lingva Respondo 16 en *La Revuo* (1907, Junio) estas klara: devus esti: aŭ la nombro de la individuaj membroj de UEA aŭ la nombro da individuaj membroj en UEA... kaj paro da geamantoj

... (J. T.)

## *Kian komputoron aĉeti? (2)*

Ni vidu, perspektive al la probabla evoluo de la aferoj, kian komputoron Esperantisto aĉetu! Efektive, nia unua artikoleto interesis relative grandan nombron da ne-specialistaj uzantoj de komputoroj : ili estas pli kaj pli multaj. Ni plu parolos al ili kiel ne-fakulo : la specialistoj havas multon alian farendan kaj ne havas tempon zorgi pri tiaj bagateloj, kiuj interesas nin!

Fakte la demando de specialaj literoj kaj de la kongruenco de la kodoj reprezentantaj ilin plu restas en la centro de la projektoj de la plej klarvidaj, ne nur Esperantistaj sed ankaŭ ĉiaj : ekzistas la ĝenerala bezono produkti dokumentojn en diversaj lingvoj, eventuale en la "ne-granda" sia! Aliaj deziras transsendi dokumentojn jen per poŝta sendo de disketo, jen per telefona sendo de siaj registraĵoj mem.

La "ĝenerale" akceptita kodaro "ASCII" ne estas universala kaj sub sia kompletigita formo ĝi kapablas kontentigi nur la uzantojn de la Angla kaj de la Okcident-Eŭropaj lingvoj (ĉiuj Latinidaj, la Germana, la Nederlanda kaj la Skandinava). Tio estas tre nesufiĉa : ASCII entenas maksimume 256 kodojn. Do estiĝis paralelaj kodaroj, ekzemple por la Japana (Latinskribe) ktp, ne parolante pri kodaroj por specifaj skriboj. Aperis interalie multaj kodaroj iel similaj al ASCII.

Antaŭ tiu kompleksa situacio iuj klarvidaj Usonaj informadikistoj iniciatis novan kodaron, kiu jam estas baptita *Unicode* sed plu estas perfektigata antaŭ definitiva eldono. Ĝi entenos ĉ. 65 500 kodojn; alidire la kvanton de 256 tabeloj same ampleksaj kiel tiu de ASCII. Laŭ nia scio, se la Francaj teknikistoj apenaŭ estas informitaj pri ĝia ekzisto, almenaŭ se ili parolas al potencialaj klientoj, ankoraŭ ne estas certe, sub kiu formo aperos niaj literoj en tiu kodaro. Laŭ iu skolo, ĉiuj literoj (ankaŭ la niaj) aperu individue por si mem. Laŭ alia skolo la diakritoj (supersignoj, trasignoj kaj subsignoj) prefere aperu aparte : tiam diakrita litero estus konsiderata kiel komplekso formita de litero kaj de diakrito; t.e. tia diakrita litero estus reprezentata per du kodoj : unu por la litero, la alia por la diakrito. En ambaŭ kazoj tamen tio definitive solvus nian skrib-problemon.

Sed oni devas atenti, ke tiam la ĝisnunaj komputoroj kun procesoroj 8-bitaj ne plu sufiĉos! Oni povos uzi *Unicode* nur sur komputoroj almenaŭ *16-bitaj!* Jam aperas *32-bitaj* komputoroj.

Do aldone al la unua artikolo, ni avertas, ke estu aĉetitaj nur tiajn komputorojn. Aldone, ĉar se *Unicode* donos al vi kodojn por praktike ĉiuj *karakteroj* (= skribsignoj, plej unua kaj etimologia senco de *karaktero*) ekzistantaj en la mondo, inkluzive de la Ĉinaj ideogramoj kaj de la Esperantaj literoj, ja ne tiu kodaro donos al vi tiujn karakterojn mem. Via komputoro kapablu trakti tiun kodaron; ja dependos de via mensvaro kaj de vi mem, pri kiuj efektivaj karakteroj vi disponos! Relegu la artikolon en la pasinta numero!

En la proksima artikoleto ni diros vortojn, kiuj interesos tiujn, kiuj deziras sendi disketojn perpoŝte aŭ registraĵojn per telefone.

Mat y Mat

## Akuzativo : ĉu "mova" aŭ "direkta"?

En pluraj objektoj kontraŭ *norden de* (n-roj 20-21) aperis la argumento, ke la "mov-akuzativo" ne estas kombinebla kun la statverboj. Tio ŝajnas tute logika – se oni akceptas la terminon kaj la principon, ke vere temas nur pri *movo*; tamen, en mia artikolo mi parolis pri *direkta* akuzativo, kaj mi insistas, ke tiu pli ĝenerala termino pli ĝuste esprimas la esencon de la afero.

Sendube, plej ofte direkto havas rilaton al movo. Plej ofte, sed ne ĉiam. Ni konsideru kelkajn ekzemplojn.

### I. Forto sen movo

(1) *Li forte premis sur la poŝtmarkon, por ke tiu pli bone algluiĝu.*

(2) *La soifo tiris la Buridanan azenon maldekstren, la egale forta malsato tiris ĝin dekstren; sekve ĝi restis senmova kaj mortis.*

Plua paŝo rezultigas movon kies direkto estas kontraŭa al tiu de la akuzativo :

(3) *Knabeto tiris sian patrinon reen al la plaĝo, sed ŝi kuntrenis lin hejmen.*

### II. Orientumo (orientacio)

(Mi riskas uzi neologismon *orientumo*, aŭ *orientacio*, ĉar la pli tradiciaj *orientiteco*, *orientiĝo* <sup>z</sup>, estas mallogikaĵoj, en kiuj verba sufikso uzurpas la funkcion de *-um* aŭ de pseŭdo-sufikso).

(4) *En la ortodoksaj kirkoj la altaro rigardas orienten.*

(5) *La malgranda ŝipo, kiu pendis malsupren de la plafono <sup>z</sup>.*

Simile, el la Zamenhofa *pendigi la kanajlon la kapon malsupren <sup>z</sup>* sekvas :

(6) *La kanajlo pendis la kapon malsupren, – aŭ :*

(7) *La kanajlo pendis kun la kapo malsupren.*

### III. Abstrakta direkto (cela stato)

En multaj okazoj oni povas paroli pri "movo metafora" (*traduki Esperanten, telefoni hejmen, ŝanĝiĝi en ion*); tamen en kelkaj okazoj oni povus argumenti, ke temas nur pri humoro, strebo, nostalgio, animstato :

(8) *Li volas hejmen, en la ne plu ekzistantan landon de sia infanaĝo.*

– la frazo signifas ne tion, ke "li" volas iri hejmen, sed plie ke li volas ree esti tie.

S. B. Pokrovskij (el Novosibirsk).

-----  
Ndir : Tiuj ok bonaj ekzemploj ŝajne demonstras, ke bona nomo de tia akuzativo estas *cel-akuzativo*. Celo estas trafita aŭ ne. *Cel-akuzativo* egalvaloras al la aldono de *al*.

---

LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO. Trimestra informo letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. – Redaktoro : Jean THIERRY. – Direktoro de la publikaĵo : André BOUR-DEAUX. – Presejo : COCONNIER, 72300 SABLÉ. – C.P.P. : n-ro 6971. – Prezo : 1 n-ro : 40 FRF – Jara abono : 120 FRF – Pagebla : ĉe kontoj : Banka : Crédit Lyonnais n-ro 7090 F – Poŝteka : 735 27 B Paris. – UEA : Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝirofiĉejo Den Haag) : nepre indiku "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto" (40 gld).

### Perantoj por diversaj landoj :

Aŭstralio : Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRIVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta) : S-ro UMEDA Yosimi, I.P.O.B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Brazilo : Brazila Esperanto-Ligo : SeS Ed Jockey Club – Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (Caixa Postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio : S-ro Claus J. GÜNKEL, Im Lichtenfelde 70, D W 4790 PADERBORN, Germanio. Poŝtĝiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301 (36 DM).

Kubo : S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-o-Redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko : S-ro Enrique LEMUS Rodriguez, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilmpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DF, Meksiko.

Svedio : Sveda Esperanta Federacio : c/o Lisbet ANDREASSON, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono : Eldonejo Bero : P.O.Box 13492, BERKELEY CA 94701, Usono (23 \$).